

Informoj:
Arto -:- Literaturo
Turismo -:- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakejo:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

SALUTO

Antaŭ longe «Frateco» deziris kaj penis presian bultenon, sian spiritan interkomunikilon kun ĝiaj societanoj.

Kelkaj el ni, studis tian deziron, hodiaŭ realaĵo.

Nia idearo estas: «por Frateco kaj por Esperanto». Sub tiu devizo povas ĉeesti ĉiuj kiuj estas esperantistoj.

Tiu ĉi bulteno alportos al ĉiuj, niajn salutojn kaj niajn entuziasmojn por Frateco kaj Esperanto; ĝi certigos pri nia vivo kaj pri niaj penadoj por pligrandigi Fratecon, tio estas, Esperanton.

En tiu ĉi marŝado, estis niaj iniciatintoj, tiuj kiuj ekvivigis Fratecon, tri fervoraj esperantistoj, kiuj antaŭ 23 jaroj, decidis fondi en nia urbo esperantan societon por la propagando, instruado kaj disvastigado de la internacia lingvo.

En la monato Julio de la jaro 1908.^a estis redaktita kaj aprobita la regularo de «Frateco». Esperanta Societo.

Por rememorigi nune la 23ⁿ jaron de la inaŭguro de nia Societo, oni fondas tiun ĉi esperantan bultenon, kies unuan numeron ni dediĉas, kiel oferdono, al la fondintoj de Frateco, kvankam bedaŭrinde jam mortintaj; sinjoroj *Agustin de Montagut*, *Emilio Gastón* kaj *Rafael Benítez*.

MORALEDUKADO

Ĉiu nobla idealo devas eniri en la porinfanan lernejon kaj esti prezentata al la infanoj, kies cerbo kaj koro devas esti modelataj de la instruisto.

La scienca lernado multe interesas, sed pli altgrade ankoraŭ oni devas zorgi pri la korpa kaj morala edukado. Neniam estas malfrue por akiri konojn pri la diversaj sciencaj fakoj; sed tre ofte ni memoras eduki la korpon kaj konscion de la infano kiam la plej deca tempo pasis.

Ni traktos pri la morala edukado kaj oni ne bezonas multe peni por kompreni ke la anuaj jaroj de nia vivo estas kiuj pli kontribuas al la formado de la homa karaktero. Oni diras ke la edukado faras ĉion, sed, tia certigo, estas relativa,

ĉar ni ne estas pastro kies formo sanĝigas laŭ nia deziro. La homo jam de la frua aĝo havas konscion pli malpli disvolvitan, propran inklinon tute sendependan de la medio kie oni vivadas. Ĝeneralan regulon por la infanedukado oni ne povas sekvi.

Tendenco, preskaŭ ĉiam akirita, estas sin supozi supera al la aliaj kaj oni devas forigi tiun malvirton. Unu el la rimedoj pli rekomendataj por tion korekti estas deviga ĉeesto de ĉiuj rangaj infanoj en sama lernejo, submetitaj al la sama regularo ekzakte ke neniŭ, kaj neniŭ, povu distingi al kia socia klaso apartenas la lernantoj kiuj amikiĝas pro reciproka altiro, pro samaj deziroj kaj inklinoj, ne pro falsa influo de la socia vivmaniero.

Sed ne sufiĉas ke la amo rilatu nur la mallargan rondon de la ĉiutagaj kunvivantoj. Ĝi devas pli etendiĝi konsiderante ke la homo ne povas izole vivi, ke nepre necesa estas kunago de la tuta homaro kaj ke nia libereco ne rajtas malgrandigi tiun de niaj similuloj, kvankam ili loĝu en fremdaj regionoj, se oni trafe povas uzi la vorton «fremdulo» rilate al samspecaj estajoj, malgraŭ rimarkindaj sed ne apartigaj diferencoj.

Ne enigu malamon ĉe la infanaj koroj. Por ami la patrujon ne estas necese abomeni tiun de aliaj. En la tuta mondo estimindajn personojn ni devas vidi, sed tio ne povas okazi se interrilatoj mankas. Jen pro kio, senĉese kaj senlace, oni rekomendas al la instruistaro ke ili ampleksigu la lernejon ke kiel eble plej ofte geknaboj el ĉiuj terpartoj kolektiĝu interkomprenante unu la alian, forigante la ŝovinismon kies konsekvencoj estas kruelaj militoj per kiuj la batalantoj favorigas la trankvilajn mastrojn de la mondaj financoj.

Utiligu la esperanta lingvon kiel paciga edukrimedo kaj la sukceso estos plena, ĉar per la reciprokaj interrilatoj ni venos en la konkludon ke la homoj devas vivi solidare. Neniŭ suferigas siajn karulojn kaj pro tio kiam ni havos amikojn kaj kamaradojn en ĉiuj terpartoj, ni ne volos esti premantoj de ili komprenante ke, nek vivi en tiu aŭ alia terzono, nek la koloro de la haŭto estas malestimindaj karakteroj.

E. ARTIGAS.

- ESPERANTA VIVO -

De kiam la simbola verda stelo aperis super la mondo, kaj la unuaj esperantistoj ekkomencis sian meritan laboron, kiom da artikoloj en ĵurnaloj de ĉiuj landoj, kaj multenombraj propagandiloj estas disvastigitaj ĉie la grandan ideon de Zamenhof. Mi kredas ke la tutmonda popolo aŭdis aŭ legis pri la utileco de la lingvo Esperanto, kiel la plej efika solvo por la spirita kunigado kaj interkomprenado de la monda loĝantaro.

La verecon de tiaj asertoj konstatas ĝoje la esperantistaro, interkorespondante kun samideanoj de ĉiu ajn lando, devigante fratan amikecon kion certe estus neeble krei kun la interskribado per naciaj lingvoj, ĉar, ĝuste, tiuj ĉi lingvoj difinas naciajn karakteron, kaj naciemaj sentoj ĉiam estas ofendsentemaj. Jen la lingvo Esperanto kiu malaperigas tiun grandan malfacilaĵon, pro kio estus sufiĉa kaŭzo por meriti ĉefan atenton se, krom tio, ĝi ne estus ankaŭ komprenebla, belsona kaj riĉa inter ĉiu ajn nuntempa lingvo.

Nuntempe, la esperanta movado estas tre progresanta. Ĉie ekzistas esperantaj Societoj kiuj ne laciĝas por disvastigi la lingvon, sed oni devas konfesi, bedaŭrinde, ke nia lando ne rimarkiĝas en la antaŭgvardio inter la nacioj kiuj enhavas grandan nombron da esperantistoj, malgraŭ tio ke ekzistas en Hispanujo vasta organizado por propagandi la ideon kaj instrui la lingvon. Ĉu tio signifas ke la hispana popolo estas kontraŭa al la esperanta movado? Ne. Okazas nur ke la registaroj ne volas kompreni tiel noblan ideon, kaj, sen oficiala helpo, la esperantistoj klopodas por propagandi la lingvon, kun entuziasmo sed ne povante promesi ian tujan kaj praktikan stimulon. Iom post iom esperantemuloj kiuj lernas Esperanton aligas la esperantistaron kaj pligrandigas la amason da samideanoj. Tio disvolviĝas malrapide ĉar la plej malfacila tasko estas fari esperantemaj, pro tio ke oni ne povas senti la ideon tutkore ĝis oni lernas, aŭ pli bone diri, estas lerninta la lingvon.

Esperantistoj kaj esperantemaj, antaŭen!! daŭrigu nian noblan kaj socian laboron.

F. TURRIÓN.

Esperantistoj!!

Parolu al viaj amikoj pri nia celo!

Ĉi tiu bulteno estas senpage disdonata.

EKSKURSO EN EL BOCAL

Kun gajeco propra de tiuj ĉi okazoj kunvenis je la sesa kaj duono en la placo Constitución la Fratecanoj efektivigontaj ekskurson anoncitan en El Bocal, unua el la ekskursoj organizotaj de Frateco je la nuna jaro.

Kiam ĉiuj ni ekskursantoj jam estis kunvenintaj, nur unu malgrandeta... detalo mankis; la aŭtomobilo en kiu ni estis translokotaj. Jam estas la sepa kaj duono kaj la aŭtomobilo ankoraŭ ne estis alveninta kaj ni jam supozis ke la prokrasto, kiun ni unue atribuis al la pezeco de la dormo de la aŭtomobilkondukisto, havis pli grandan kaŭzon, ĉar la nura kaŭzo de la prokrasto estis neseriozeco de la societo automobilista. Fine, s-roj Guillen kaj Bruquetas atingis alian aŭtomobilon de alia societo kaj per ĝi komencis ni la vojaĝon je la oka kaj duono.

Ne estis vojaĝintaj ni pli ol du kilometrojn kiam jam montriĝis la bona humoro de la ekskursantoj, estante nia honora Prezidanto kiu komencis kanti bonhumorajn kantaĵojn. Tiu ĉi bona humoro jam ne ĉesis je la tuta vojaĝo. Kelkaj parolis esperante, kelkaj kantis, aliaj parolis hispane, ĉar, bedaŭrinde, ne ĉiuj ekskursantoj konas nian karan lingvon; tio ĉi estas agrablega konfuzkriado.

Post okdek kvin kmjn., ni alvenis en El Bocal, loko de la ekskurso. Arbaroj foliplenaj, kreskajaro multekvanta, promenejoj kaj ĝardenoj delikate zorgataj, akvo ĉie ĉirkaŭanta: tio ĉi estas El Bocal. Post iom da tempo s-ro Ruste, el El Bocal, proponis akompani nin por gvidi kaj klarigi al ni ĉion kion ni volus demandi al li.

Ni vidis la akvtranĉildomon, kie la kanalo prenas la akvon el la rivero Ebro, enirante ni en ĝian internajn akompanataj de s-ro Ruste, kiu ilustris nin per siaj klarigadoj.

Poste s-ro Bruquetas ordonis al ni grupiĝi por fotografi nin kaj tiel ni faris.

Jam estas horo tagmanĝa kaj s-ro Ruste montras al ni bonan lokon por la tagmanĝo, nomatan «El Castaño» kaj al tiu ĉi loko ni iras. Estas tiu ĉi loko foli plena en kies centro staras kastanarbo kiu kovras per sia ombro tablojn kaj benkojn ĉirkaŭe kaj ni sidigis. Niaj ĉirkaŭaĵoj estas florhavaj ĝardenoj, domo nomata de Karolo V^a, k. t. p. Ĉiuj estantoj dediĉis sin al la agrabla laboro disvolvi la manĝaĵojn.

Post la manĝo ni dediĉis nin vidi la domon de la Direktoro de la Kanalo (antikva palaco nomata de Karolo V^a), la publikan preĝejon kaj la stratojn de tiu loko.

Kiam la horo foriri jam estis ĉiuj ni enveturiĝis, adiaŭinte kaj dankinte al s-ro Ruste kaj

al s-ro Royo Villanova (inĝeniero kaj samideano) iliajn ĝentilajojn kaj iris en Tudela, kie ni ĉeestis dum unu kaj duono horo por vidi belajojn kiujn, kiel antikva urbo, ĝi enhavas. Denove sinjoro Bruquetas faris kelkajn fotografajojn kaj poste ni daŭrigis la revenon en Zaragoza.

La bona humoro pliiĝis kaj la ekskursantoj preskaŭ elkonsumis sian repertuaron de kantajoj, kvankam tiu ĉi estas tre vasta. Iom post iom la gorgoj laciĝis kaj kiam ni revenis en Zaragozo, ĉio estis silento en la aŭtomobilo kaj poste ĉiuj kontentigataj iris en niajn hejmojn.

F. ETAYO.

Esperantistoj!!

Vi debas peni por atingi novan anon por ke Frateco estu fortega!

RAKONTETO

Kiam mi estis kunlaboranto de ĵurnalo, ĉiumatene vizitis min kolombineto, pura kaj blanka kiel la neĝo, kiu tiel bone parolis, ke ĝi ŝajnis princino aliformiĝinta belegan kolombinon.

Tiame mi skribis fakon, titolitan «Eĥoj de la Montaro». Kiom da helpo pruntis al mi tiu bela kaj saĝa birdo! Kiel mi antaŭdiris, ĉiujn tagojn ĝi venis, kaj alproksimiĝante ĝis ripozi sur mia ŝultro, dum mi ĝin karesis per la dekstra mano, ĝi rakontis nallaŭtege ĉe nia maldekstra orelo, la plej strangajn aĵojn okazintajn en, kaj trans la montaro. Tiamaniere miaj artikoloj baldaŭ famiĝis ĉie.

Ian belan matenon, kiam la printempo komenciĝas, la arboj ekfloras kaj la hirundoj ĵusrevenintaj majeste flugas kaj ame pepadus, la atendita kolombineto alvenis, kaj malfermante ĝian gracion beketon komencis paroli tiel:

Vi ĵurnalisto de urbo, kiu scias ĉion kio okazas en la tutmondo kaj ankaŭ tion kio ne okazas; aŭskultu:

Vi scias neniom pri la vivo kaj aĵoj en la montaro; tie loĝas ankaŭ, kiel tie ĉi, en ĉi tiu urbo, kreitajoj kiuj posedas animon kaj koron, kaj ili sentas, pensas kaj amas, kaj tie kie estas amo, sento kaj penso ekzistas fantazio kaj la fantazio kreas poezion kaj feliĉon, kaj precipe fantaziajn popolajn heroojn. Ĉi tiuj montaranoj pri kiuj mi parolas posedas heroinon, kaj kiam ili, ion pri ŝi

rakontas, sin montras tiel fantaziemuloj ke ili esperas ian iri rajdantaj sur la famega ĉevalo «Pegaso» viziti sian princinon kiu reĝas en la plej nekonata lando.

Atentu do, kaj vi scios ke inter montoj, en la valo, sin trovas mezepoka kastelo, kiu ĉiam rememoros, la mildan ravantan princinon de nigraj, malgajaj okuloj kiu per sia rigardo, gajigis la sentimentalajn loĝantojn de ĉi tiu montaro.

Sed la princineto estis melankolia..... ŝia malfeliĉo devenis de kiam, ŝia amanto, kristana brava kavaliro foriris en Azion por militdefendi la Kristan kredon. Ŝi lin atendis, multajn, multajn jarojn, kaj dume; ĉiu nokte ŝi eliris sur la rigardejon, plena je belfloroj, de la kastelo; ĉiu floro entenis por ŝi aman iluzion, ĉiŭ folio la plej dolĉan esperon: kaj subite ŝi ekludis harmonian harpon, kaj per ŝia najtingala gorgo kantadis; kaj en la valo, en la montoj kaj eĉ en la koroj de la montaranoj, resonis la delikatega melodio kaj la eterna amkanto, poste ŝi rigardadis al ĉiuj direktoj, sed la kavaliro neniam revenis; la vizaĝo de la princineto pleniĝis je larmoj; en la kastelo ekregis silento, nur estis aŭditaj blekoj de la noktaj birdoj, la princino de nigraj okuloj songis..... songis eterne pri sia amanto.....

Unu post alia pasis multaj tagoj kaj ian nokton, la princino nek ludis nek kantis, kaj la montaranoj tre priokupataj ĉiujn demandis; ĉu la amanto venis? Ĉu la princino pro malgajo mortis?

Kia estas la kaŭzo? Neniel kaj nenie povis dormi la montara najbararo dum tia nokto. Ektagiĝis kaj la servantaro de la kastelo, sciigis, deklaris, ke la princino estis malaperinta mistere de sia reĝa loĝejo. La sciigo pri la malapero de la «Montara Stelo», kiel ŝi ankaŭ estis nomita, kuris rapide de buŝo al buŝo kaj ĉie, homoj, virinoj kaj geknaboj, dum la unuaj ŝin vokis voĉlaŭtege, la duaj preĝis kaj la aliaj ploretis. Sed vane, la princino malaperis por ĉiam de la kastelo, kaj ŝiaj melodioj kaj amkantoj ne plu aŭdiĝos en la ĉi-tiea poeta pejzaĝa loko.

Ĉiujn pastistetojn oni demandis, ĉu ili estis vidintajn ion pro kio povus esti klarigota la mistera afero. Grandsurprize, du maljunaj pastistoj, rakontis, ke la saman tagon kiam okazis la malapero, dum ili preparis la ŝafaron ekvojiri, tiam kiam la suno ekbrilas en la ĉielo kaj la birdoj bonvenas la novan tagon, ili restis admiritaj vidante neimageblan spektaklon; du grandegaj agloj trenis rapidege fajran flugilan ĉaron en kies mezo sidantan, oni vidis virinon kiu ludis muzikilon kaj samtempe kantis per dia voĉo.

Tremis terure la najbaro de la montaro pro tiu sciigo, kaj ĉiuhore ili pensis kaj parolis fantazie, ĝis tago, kiam en la spaco estis aperinta

aglo kiu jetis, korbeton plena je diverskoloraj floroj kaj leteron kiu diris:

«La princino loĝinta en la kastelo de via montaro, vekigis post longdaŭra sonĝo kaj ŝi sin trovas en tiu nekonata kaj nepriskribebla lando, en kiu nur estas floroj kaj papilioj el la plej belaj kaj delikataj koloroj. Tie la amo kaj feliĉo daŭras eterne; dum la printempa sezono kaj ĉiunokte, mi sendas ĉiujn lokojn tra la aero, la sonojn de mia harpo kaj la amkantojn elirantajn el mia koro, poste kiam la vintro venos, mi dormos kiel la floroj dormas kaj denove kiam mi vekigōs mi rememoros la kastelon, la montaron kaj la amanton ne plu revenontan.

Same kiel multaj viroj la floroj tre amas la virtajn honestajn virinojn, tial, ili, min vidante, kliniĝas sur teron kaj ĉiuj samtempe kiel militkrio, ekkrias:

Vi estas princino, floro inter floroj kaj de nun, Reĝino de la nekonata lando de la floroj.

Por ĉiam adiaŭas vin, la princino de la kastelo, kiu atingis esti reĝino».

Nuntempe, kiam la printempo venas, la fantaziemaj montaranoj, kredas aŭskulti en la nokta silento, la ravan muzikon kaj la dolĉajn amkan-
tojn de la reĝino de nigraj okuloj.

Finite la rakonto, la kolombineto eksaltis ĉirkaŭ mi kaj forflugis.


Originale esperantverkita.

J. L. B.

Esperantistoj!!

Konvinkigu ilin je la boneco de nia idealo!!

Disvastigu la helpan internacian lingvon **ESPERANTO!!**



Redaktoroj de la Bulteno estas sinjoroj: Maynar, Achón, Artigas, Orós, Salas, Bruquetas, Gastón, Etayo, Larruga, Turrión, Floría kaj la esperantistoj kiuj deziras helpi, sendante siajn verka-
jojn ĉio povos esti publikigata: artikolo, rakonto, anekdoto, spritajo, k. c.

Ni legas en LA KOMERCO, Oficiala Bulteno de komercista Esperanto Unio:

KEU povis konstati en lasta tempo, ke dank' al notoj en naciaj gazetoj, eĉ ne Esperantistaj firmoj petis servojn kaj ofertojn! Se ĉiu farus vian devon, t. e. ĉiam atentigus komercistojn pri niaj servoj, kaj mem mendus pere de ni, ni baldaŭ atingus nian celon kaj povos esti utilaj, eĉ ankaŭ finance, al la tuta Esp.-movado.

Do, kunagu, kunlaboru, mendu!

Esperantistoj! En nia klubo FRATECO, ĉiutage vespere, de la 7.^a ĝis la 9.^a ni atendas vin, dezirante interparoli esperante kaj pritrakti diversajn aferojn, rilate al nia Societo kaj al la esperantista movado.

Julio 1887.—Apero de la «Unua Libro» de Dro. Zamenhof, kun la titolo: «Dro Esperanto, Internacia Lingvo, Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro».

Sur la libro estas presitaj la jenaj gravaj frazoj: «Lingvo internacia, kiel ĉiu nacia, estas proprajoj de ĉiuj». «La aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi». «La rajto de traduko de tiu ĉi broŝuro en ĉiujn aliajn lingvojn apartenas al ĉiuj».

Tiuj ĉi tri frazoj estas pli ol sufiĉaj, por ke la novaj esperantistoj povu kompreni kiel kaj kiu estis dum sia vivo Dro. Zamenhof, aŭtoro de la internacia lingvo **ESPERANTO**.

FLORÍA.

Jen tri nomoj por la historio de «Frateco»: Gastón, Montagut kaj Benítez.

Esperantistoj!!

Helpu nin!

Venu en nian klubon
FRATECO:

Strato Roda, nums. 14-16

ZARAGOZA